

ISSN 0014-0694
Decembro 2002 • 90-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:
Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: nordenstorm@hem.utfors.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi och Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2002: 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2003:
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-
der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-
rantisternas Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Agneta Emanuelsson

Stopdatum för nästa nummer: 15 januari 2003.

Manus till La Espero
sänds till Leif Nordenstorm
Järnvägsgränd 11
961 76 Boden
tel. 0921-123 54
e-post: nordenstorm@hem.utfors.se

Karl Elofsson

Kontaktion kun Esperanto mi ricevis per kuzo kaj kiam li komencis studrondon en la fino de 40-aj jaroj mi partoprenis. Kiam la kurso estis finita oni fondis la Esperantoklubon de Leksand kaj Insjön kun dekduo da membroj.

En 1950 dek de la membroj veturis al Parizo per trajno por la UK. Dum la veturo aliaj esperantistoj eniris la trajnon, en Svedio kaj eksterlande. Tiamaniere mi kaj miaj kamaradoj havis multajn okazojn uzi Esperanton.

Loĝon mi ricevis en amasloĝejo en la latina kvartalo en la periferio de Parizo. Tie loĝis kongresanoj el pluraj landoj. Precipe mi memoras la solelan inaŭguron de la kongreso, kiam oni ludis la Esperantohimnon kaj Lapenna faris la malferman paroladon. Pli ol dumil partoprenantoj ĉeestis. Tiam mi ekflamiĝis pro Esperanto kaj vizitis preskaŭ ĉiun duan kongreson.


La kongreson en Varsovio en 1959 mi tre bone memoras. Estis tiam, kiam la rusoj startigis sian kosmovojaĝan programon. En la Kopernikmuzeo oni povis vidi kopion de la sputniko, kiu transportis la hundon Laika en la kosmon. Mi aŭskultis prelegon kiel oni lancas satelitojn kaj igas ilin sekvi antaŭdestinitan orbiton.

En 1963 mi veturis per aŭto kun Lennart kaj Inez Lagerkrantz tra la orienteŭropaj ŝtatoj al UK en Sofio. En Budapeŝto ni vizitis familion, kun kiu Lagerkrantz korespondis. La hungaroj nin petis ne parki la aŭton tro proksime al ilia loĝejo kaj ne tro longe. Tiam ne estis konvene intertrali kun eksterlandanoj.

Post la kongreso en Sofio pasis pli ol dudek kvin jaroj antaŭ ol mi partoprenis en mia sekvanta kongreso.

Mi pli rakontas kiel mi respondis anoncon en vespera ĵurnalo je kristnasko en 1962. *Plumbisto estas serĉata por laboro en Persujo. Plurlingva persono estas preferinda.* Mi diris, ke mi plene posedis Esperanton kaj ke Esperanto estas bona bazo, se oni volas lerni novajn lingvojn. Krome mi diris en mia respondo, ke mi vizitis multajn landojn kaj lernis intertrali kun homoj el pluraj nacioj.

Mi ne ricevis respondon pri la poseno, sed en la aŭtuno de 1963 mi estis petata al Stokholmo por diskuti dungon en Liberio kaj estis dungita. Mi subskribis kontrakton por unu jaro. Kun du aliaj metiistoj mi flugis tien kaj post la alveno al la flughaveno ni veturis per taksio al la mineja vilaĝo. Ni estis enloĝigitaj en barakojn



kie jam loĝis italoj.

La loka ĉefo estis svedo. Li rakontis, ke oni laboris kune kun itala firmao, kiu havis la taskon konstrui vilaĝon. Mi iĝis la submastro de kvin junaj afrikanoj, kiuj nomis min Charlie. La itala laborestro anoncis, ke la laboro estis *urgent* kaj dank'al Esperanto mi komprenis kaj iom post iom lernis diskuti kun la italoj.

Post unu jaro, kiam la kontraktperiodo estis finita, oni demandis min, ĉu mi volis plilongigi ĝin kaj mi respondis jese. Mi decidis labori tie ankoraŭ duonjaron.

Kiam la ses monatoj forpasis mi revenis al Svedio. Nelonge mi restis hejme antaŭ ol la firmao telefonis el Stokholmo kaj petis min denove vojaĝi al Liberio por labori en la havenurbo. Mi akceptis. La kontraktperiodo estis ses monatoj, sed ĝi pludaŭris ankoraŭ tri monatoj.

Post la naŭ monatoj mi kaj alia sveda kolego ne flugis la rektan vojon hejme. Ni vizitis i.a. Rio-de-Janeiron kaj Buenos-Ajreson. Kiel kremo sur la kompoto ni pasigis semajnon sur la insulo Trinidado!

Mi ne longe estis hejme antaŭ ol mi komencis sopiri reiri al eksterlandaj taskoj. Mi kontaktis SIDA-n, kiu proponis al mi aspiri laboron en la sveda pacbrigado, kion mi faris. Mi estis dungata. Tio okazis en 1968.

Mi partoprenis preparajn kursojn dum kelkaj semajnoj en Västerås kaj poste mi flugis al Etiopio kun dek aliaj svedoj. Kontraktperiodo estis du jaroj.

En Adis-Abebo al mi kaj alia svedo estis donata vilao. La ĉirkaŭdomo estis formita de forta barilo havanta feran pordegon. En la ĉirkaŭdomo ankaŭ troviĝis malgranda dometo, kie loĝis gardisto kun siaj edzino kaj infano. Dum la du jaroj kiam mi tie loĝis, mi ne havis ŝlosilon, sed ĉar la tuta Etiopio estis mia— laborkampo, mi malofte estis hejme tre longan

tempon.

Mi havis junan etiopan trubiston kiel kolego dum la tuta tempo. Ni provis konversacii en la angla lingvo, kiu estis la tria lingvo de Etiopio. Mi ankaŭ lernis iom da amharo, kiu estas la kutima lingvo en Etiopio.

Dum mi estis en Etiopio mi ricevis telegramon el Liberio, kie ili min petis veni kaj labori por la mineja kompanio. Mi akceptis kondiĉe, ke mi unue povis fini mian laboron en Etiopio. Mi nun havis trijaran kontrakton kun unu senkosta hejmeniro ĉiujare.

En Liberio mi renkontis plurajn liberianojn kun kiuj mi antaŭe laboris. Mi ankaŭ renkontis svedajn konatulojn. Unu el ili havis liberian edzinon kaj mi ofte vizitadis ilan hejmon. Tie mi ankaŭ konatiĝis kun kuzino de la liberia virino kaj tia kuzino iĝis mia edzino i.a. dank'al sia kuirarto. Kiam mi manĝis fiŝpladon, kiun ŝi preparis, estiĝis *klak* en mi! Mi nun ricevis pli grandan loĝejon, vilaon tute malsimilan al la simpla nesto de fraŭlo, kiun mi antaŭe havis. Oni permesis al mi kunpreni ŝin, kiam mi faris mian ĉiujaran vojaĝon al Svedio.

Unu de la unuaj taskoj, kiujn mi ricevis, kiam mi komencis labori por la minkompanio estis rekonstrui la akvocentralon tiel, kiel ĝia kapableco iĝis duoble pli granda. Mia laborestro estis anglo kaj ni bone interkonsentis.

Post kelka tempo mi ricevis proponon preni sur min la respondecon por la tubinstalado. Mi akceptis kaj tial ricevis pli bonan loĝejon, vilaon, en distrikto, kiun oni nomis dandaltajo.

Mi atentigis, ke la kloakosistemo estis eluzita kaj kun nesufiĉa kapacito. Ĝi estis konstruita por 4 000 loĝantoj sed nun la nombro estis 20 000. Kunveno de akciuoj disponigis monon al la projekto. Sveda konsilanta firmao faris desegnaĵojn kaj germana firmao ricevis la taskon konstrui la novan sistemon.

Iun matenon kiam mi venis al mia laboro, mi trovis du indiĝenajn sekretariojn plorante, ĉar ilia angla ĉefo estis maldungita.

La tempo pasis kaj la kondiĉoj iĝis

ĉiam pli malbonaj. La indiĝenaj laboristoj komencis striki kaj en la ĉefurbo estiĝis politikaj manifestacioj.

Post la lastaj ferioj en Svedio mi mendis domon antaŭ ol denove vojaĝi al Afriko por miaj lastaj tri monatoj tie. La tempo en Afriko nun estis maltrankvila. En februaro 1979 la prezidanto estis murdita kaj ĉiuj ministroj fuzilekzekutitaj.

Post la tri monatoj mi kaj mia edzino preparis la vojaĝon al Svedio kaj ni sukcesis foriri sen tro grandaj malfacilecoj. La familio konsistis krom la du plenkreskuloj el du knabinoj, filino de mia edzino kaj filino de ŝia frato.

La mendita domo staris preta, kiam ni alvenis al Leksand. Nun komenciĝis la mebla aranĝo. Reveninte al Svedio tempo pasis antaŭ ol mi rekomencis interesiĝi pri esperanto. Sed kiam Lennart Persson, mia amiko kiu loĝis en Jugoslavio kun jugoslava edzino kaj du infanoj, venis hejmen al Leksand, mi komencis interrilati kun li. Tiam ne troviĝis aktiva esperantoklubo en Leksand kaj tial ni iĝis membroj de la Esperantoklubo en Dalekarlio.

Kiam mi per L. Lagerkrantz ekaŭdis pri la projekto Esperanto-Gården mi investis kelkajn centkronajn biletojn kaj partoprenis la unuan SEF-kongreson tie. Mi vidis, ke multe da laboro bezonas esti farita kaj mi deklaris min preta labori kiel tubisto kaj ankaŭ kiel lignajisto kaj masonisto. Mi estis helpata de Harald Andersson.

Ĉion, kion mi faris kaj espereble faros en Esperanto-Gården, mi faras de dankemo por tio, kion Esperanto donis al mi. Sen la sperto pri Esperanto mi ne aŭdacis aspiri pri la laboro, kiu min kondukis en la vastan mondon kaj mi ne havus tiun familion, kiun mi havas. Mi tamen bedaŭras, ke mi perdis iom de mia esperantosciado dum la tempo, kiam mi devis uzi la anglan lingvon kiel laborlingvo.

Nun, kiam mi provas paroli Esperanton, mi ofte enmiksas anglajn vortojn.

Karl Elofsson

Pludaŭro de la artikolo "Je, unasema Kiswahili?" el paĝo 4.

amaso da vortoj.

La kutima vorto *au* en svahilo fakte signifas "aŭ" en Esperanto. Ĉu hazarde? La du vortoj trovas siajn originojn en la araba respektive latina.

La pronomo *wewe* signifas "vi" (singularo). Antaŭe oni uzis ankaŭ la sinoniman, sed malestimigan, vorton *we*. Kiel la Esperanta "ci", tiu vorto provokis kritikon.

Svahilo ne malhavas onomatopeajn vortojn. Ekzemploj estas *pikipiki* (motorciklo), *tingatinga* (traktoro) kaj *rasharasha* (pluveto).

La vorto *safari* (vojaĝo) de svahilo estis asimilita al multaj lingvoj kun pli specifa signifo, "turisma ekspedicio en Afriko" klarigas A. Cherpillod en *Nepivaj Vortoj* la vorton "safario".

Konkludo

Svahilo donas al la propagandantoj de la ideo de internacia lingvo bonan ekzemplon ke la klopodoj kroniĝas per sukceso kiam lingvo sufiĉe logika kaj tial facila estas politike apogata. I.a. danke al la deziro ekde la komenco de la ŝtato Tanzanio malhelpi la etnajn/lingvajn konfliktojn en la lando per komuna dua lingvo, tiu lando suferis malpli da etnaj konfliktoj ol aliaj afrikaj landoj, malgraŭ profunda (almenaŭ kvar inter si tute malsimilaj lingvogrupoj) kaj vasta (ĉ. 120 lingvoj) lingva diverseco. Tamen la ekzemplo ne estas perfekta. Svahilo ne estas tute neŭtrala. Ĝi estas la lingvo de la svahilanoj en Zanzibaro. Ĉu hazardo ke la gravaj konfliktoj ĉefe rilatas Zanzibaron?

Jan Setréus

Je, unasema Kiswahili?

Svahilo estas tre disvastigita orientafrika lingvo. Ĝi estas oficiala kaj la plej bone konata lingvo en Tanzanio kaj en Kenjo. Krome ĝi estas unu el la plej grandaj lingvoj en Kongo (antaŭa Zairo), parolata en la orientaj kaj sudaj partoj de la lando. En Ugando, Ruando kaj Burundo svahilo estas konata kaj parolata en kontaktoj inter personoj de malsamaj gepatraj lingvoj. La plej norman svahilon nuntempan oni trovas en Zanzibaro. Tamen eĉ en Tanzanio svahilo estas plej ofte la dua lingvo de la infanoj. Sed per pli oftaj interretnaj edziĝoj svahilo fariĝas la komuna lingvo de la geedzoj kaj tiel la gepatra lingvo de la infanoj.

Svahilo estas bantua lingvo. Tio signifas ke ĝi apartenas al la plej ampleksa grupo de lingvoj subsaharaj, kaj havas multajn komunajn trajtojn kun tiuj lingvoj. Hazarde, aŭ kiel paralela fenomeno pro similaj kaŭzoj, svahilo havas plurajn trajtojn komunajn ankaŭ kun la internacia lingvo Esperanto. Ĝi evoluis en medio de komerco inter bantuoj kaj araboj, kaj fariĝis lingvo de interkompreniĝo. Ĝi havas logikan pli malpli aglutinan strukturon.

Prononco

Oni emfazas la antaŭlastan silabon, kiel en Esperanto, nur kun neglektable malmultaj esceptoj.

Kiel en la internacia lingvo ĉiu litero (aŭ kombino de du literoj) havas specifan prononcon. La vokalojn kaj multajn konsonantojn oni prononcas

kien en Esperanto. Tiel ĝi diferencas la du lingvoj. La svahila litero maldekstre korespondas al la prononco en Esperanto dekstre.

Svahilo	Esperanto
ch	ĉ
gh	voĉa ĝ [ofte prononcata g]
j	dj, dj
kh	ĥ
m	m aŭ kiel vokalo
n	n aŭ kiel vokalo
ng	ngg
ng'	ng
sh	ŝ
th	lispa
w	ŭ
y	j

Gramatika reguleco

La bazo de vortkonstruo en svahilo, same kiel en Esperanto, estas la radiko. Plej ofte la radiko en svahila vorto estas akompanata de afiksoj.

Ekzemple la radiko *chungwa* signifas la vorton "oranĝo". La pluralon oni konstruas per aldono de la silabo *ma-*, do *machungwa* estas "oranĝoj". Aldoninte *m-* antaŭ la radiko dirante *mchungwa* oni transformis la oranĝon en tutan arbon, t.e. "oranĝarbo". La substantivoj de svahilo apartenas al diversaj klasoj kun siaj deklinacioj, do multe pli komplike ol en Esperanto. *Mchungwa* apartenas al la klaso de arboj kaj aliaj plantoj. Laŭ gramatika regulo tiuj substantivoj anstataŭigas *m-* per *mi-* en pluralo. Sekve *michungwa* estas

"oranĝarboj". Nia unua ekzemplo *chungwa* tamen apartenas al alia klaso, kiu enhavas multajn fruktojn k.s. Troviĝas ankoraŭ kvar kutimaj klasoj de substantivoj (dependas iom de kiel difini la koncepton klaso).

Tre speciala klaso de substantivoj estas tiu de la silabo *ku-*. En tiu klaso la substantivo identigas kun infinitivo de verbo, kiel latina gerundio. Malsame en Esperanto ĝi kelkaj aliaj lingvoj partecipo ludas tiun rolon. Ekzemple la vorto *kucheza* ĉefe signifas "ludi" sed ankaŭ kelkfoje interpretiĝas "ludo". La vortfarado de svahilo ankaŭ ebligas konstruon de aliaj substantivoj surbaze de la sama radiko, ĉi-ekzemple *chezo* aŭ *mchezo* kiuj vortoj signifas "ludo, sporto" k.s. kaj *mchezi* aŭ *mchezaji* kiuj signifas "ludanto, sportisto" k.s.

La infinitivoj de bantua origino finiĝas per *-a*, sed troviĝas ankaŭ multaj pruntvortoj de la araba kies infinitiva finaĵo estas *-e*, *-i* aŭ *-u*. Sen la silabo *ku-* la verbo formas imperativon de la infinitivo. Ekzemple *cheza* signifas "ludu". Per infikso oni konstruas prezencan (*-na-*), preteritan (*-li-*), perfektan (*-me-*) kaj futuran (*-ta-*) formon de la verbo. Prefikso povas indiki la personon; *ni-* (mi), *u-* (vi, ci), *a-* (li, ŝi, ĝi), *tu-* (ni), *m-* (vi), *wa-* (ili). Ekzemple *ulicheza mchezo* signifas "vi ludis ludon". Troviĝas ankaŭ memstaraj personaj pronomoj en svahilo. Svahilo similas Esperanton ankaŭ rilate la uzon de sufiksoj kiuj modifas la verbon, ekzemple transitivigas ĝn. Tiel *kuchezesha* signifas "ludigi".

Menciinda ankaŭ estas la akuzativo, en Esperanto konstruita per al finaĵo *-n*. En svahilo infikso povas indiki la akuzativon, ekz. de personpronomo. *Kuona* signifas "vidi". *Watani-ona* signifas "ili vidos min".

La manko de artikolo en svahilo ankaŭ estas kompensata per tia infikso. Por la klaso de *mchezo* (la "arbo-klaso" de substantivoj) tiu infikso estas *-u-*. *Tutacheza mchezo* signifas "ni ludos ludon", sed *tutaचेza mchezo* signifas "ni ludos la ludon".

Demandaj vortoj estas uzataj kiel en Esperanto; *mbona* (kial), *wapi* (kie) k.t.p. La vorto *je* korespondas al "ĉu" en Esperanto. *Je umecheza mpira* signifas "ĉu vi ludis (pied)pilkon".

Vorttrezoro

La fundamento de svahila vorttrezoro estas bantua. Sed ĉ. triono el la vortoj de svahilo venas de la araba. Nuntempe la angla lingvo kontribuas per

La artikolo pludaŭras en paĝo 3.

Medikamentvendi-
sto. Li anoncas:
"Naturmedikamen-
toj. Gonoreo. Altigo
de vireco..."



Tillfälle för information och försäljning

Svenska Bok- och biblioteksmässan invigdes torsdag den 19e september klockan 12.00 av Mauno Koivisto, finsk president 1982-94, och Anna Falck, vd för Bok och Bibliotek på Svenska Mässan, där Göteborgs-UK kommer att äga rum i juli 2003.

I år hade man alltså valt att särskilt uppmärksamma den finska litteraturen och kulturen. Cirka 70 författare, bland andra Märta Tikkanen, framträdde med uppläsningar, man spelade finsk tango och teater och visade film. Mauno Koivisto hade med sig sin egen i Finland 2001 utkomna bok "Den ryska idén - Min syn på Rysslands historia", som är den svenska titeln. Den är hans tolfte bok. Ett annat inlägg var Konsten att tiga - den finska tysthetens rum!

Nästa år blir det polsk inriktning, vilket passar oss esperantister med tanke på vår grundare Zamenhof. Polens ambassadör i Sverige, Marek Prawda, inbjöd i år till cocktail med anledning av att Adam Mickiewicz-Institutets avdelning för litteratur för första gången i Sverige ställer ut på Bok & Bibliotek 2002.

Läs för livet - Läsrörelsen - Gör översättaren synlig, var en andra inriktning på mässan, som passade oss representanter för Eldona. Det presenterades program för översättare och seminarier om översättningar, "att hitta meningen bakom orden".

Rekordstort, fantastiskt och underbart var ord man ofta hörde och gärna själv använde. Antalet besökare var enligt mässtidningen 108731, först fackbesökare under torsdagen och halva fredagen, sedan allmänheten, utställningsytan var 11 703 kvadratmeter och antalet utställare 918 från 34 länder. Seminarieprogrammet var imponerande! Antalet seminarier var 533, antal medverkande cirka 750 och antalet seminarier på andra språk än svenska 47.

Där kunde man träffa författare från 35 länder och mer än 1 000 ackrediterade journalister. En för mig särskilt intressant arena var Centrum för Mänskliga Rättigheter med 46 deltagande utställare.

Vårt förlag, Eldona Societo Esperanto, som deltog tillsammans med Göteborgs Esperantoförening och Svenska Esperantoförbundet, hade fått en fantastiskt bra belägen monter! Nästan alla mässbesökare måste passera. Skylten Esperanto-platsen syntes väl och blev också vald som bakgrund till en del TV-intervjuer, vilket medförde, att en del av oss

esperantister visades i TV. Sveriges Radio gjorde intervjuer om den viktigaste språkfrågan, som sedan sändes i Språket, Spraket på internet-svenska, där en av våra deltagare också medverkade.

Göteborgs Esperantoförenings broschyr med innehåll om Esperanto och höstens träffar och kurser i Göteborg med bland annat adresser på nätet blev populär bland unga besökare, och vi tryckte upp nya då och då. Vi visade och sålde våra böcker och informationshäften och informerade om provlektion i Esperanto av Atilio Orellana Rojas, på besök i Göteborg inför UK och Institutets seminarium i Lesjöfors.

Vi skapade en hel del goda kontakter med tryckare, riksdag, regeringskansliet, Svenska Institutet, Lingua-phone, de Litterära Sällskapen, Utrikespolitiska institutet, Inläsnings-tjänst, Svenska UNESCO-rådet, SIDA, Statens kulturråd, Svensk Biblioteks-förening, Kristianstadstryckeriet, Bibliotekstjänst, bokhandeln, universitet och högskolor, författare och översättare...

Vi har lärt oss en hel del inför kommande år...

Litterärt café, Sveriges Författarförbunds scen, Sveriges största läshörna presenteras av Sveriges Tid-skrifter med personer som Amelia Adamo, Maj-Gull Axelsson, Peter Englund, Carin Mannheimer, Alexandra Pascalidou, Ludvig Rasmusson, Olle Stenholm ...

Svenska facköversättar-föreningen, SFO, har ca 700 medlemmar, som översätter till 32 språk och från 35 språk. De behärskar 67 olika ämnesområden. Det delades ut priser och utmärkelser. Förutom böcker och kataloger fanns bilder och foto, teater och film.

På de Litterära Sällskapens scen presenterades 15-minuters-program om Harry Martinsson, Frans G Bengtsson, August Strindberg, Selma Lagerlöf och en hel del andra. Vi talade med representanter för enskilda sällskap och DELS, De Litterära Sällskapens Samarbetsnämnd.

Alf Henrikson - Sällskapet och Bokförlaget Simon Editor arrangerade seminarium med Victor Rojas och Ramón Latorre "Om hur Oden och Tor lärde sig spanska"! på grund av deras översättning av Asken Yggdrasil till spanska, vilket intresserade oss, som snart ger ut denna bok på vårt eget språk esperanto. Vi passade på att visa och även sälja Orm la rugxa och Aniaro till de respektive

sällskapen.

Kataloger, kataloger, kataloger... Kulturrådet hade med årets barnboks-katalog, vi hade våra sista bok- och lärobokskataloger, Alhambra hade en mycket intressant, Bibliotekstjänst hade med Bokguide för bibliotek och skola 2002-2003. SOFI, Språk - och folkminnesinstitutet, hade sin bok-katalog, och en av Studentlitteraturs kataloger var Språk och Humaniora.

Och vi upplevde, köpte eller fick Modesty Blaise, 194 europeiska kulturtidskrifter, scenprogram alla dagar, Bli journalist på 30 minuter med Anders Lugn, VD i Journalistgruppen, Lära oss skriva journalistiskt på 20 minuter, ett seminarium också med Anders Lugn.

Pia Hagmar höll seminarium om Att skriva Lättläst för nybörjar-läsarna. Hon skriver två bokserier för B Wahlströms Lättlästa böcker.

Barnbarnens Kulturfond ställde 13 frågor till partierna med anledning av riksdagsvalet 2002.

Peter Englund med flera berättade om dagens Nils Holgersson. Vi fick lära oss Hitta rätt på internet med internetbrus.com

Något som verkligen fick uppmärksamhet på mässan var Ordfront med Noam Chomsky, som kritiserar USA efter 11 september och bl a har sagt "De, som tänker själva, blir ofta taxichaufförer", och Sanna Vestin från Katrineholm med sin intressanta flyktningbok, FIB:s lyrikklubb Galago, Grönköpings veckoblad, Strix med flera.

I mässtidningen kunde man bland annat läsa, att Tomas Tranströmer, Sveriges mest älskade och internationellt mest berömde poet, spelade i Rum för poesi. Han framträdde som pianist i samband med att en ny CD från Bonnier Audio presenterades. Jag var med i publiken en stund men måste lämna den stora salen på grund av akut syrebrist! Så var det på många håll, trångt, överdådigt och absolut proppfullt! På söndagen, då Noam Chomsky talade i Skandinavium, fick många inte ens komma in! Det är egentligen ett ofantligt slöseri att samla all denna fantastiska kultur bara under fyra dagar, för allmänheten endast drygt två dagar! Man hinner bara se en mycket liten del av allt och lyssna på och tala med några få av favoritförfattare och andra intressanta människor. Men många författare och översättare uttryckte glädje över att träffa kollegor och läsare.

Agneta Emanuelsson

Esperanto aŭ esperanto

Kio estas la diferenco inter "esperanto" kaj "Esperanto"? Ĉu oni skribu la vorton per komenca majusklo aŭ ne? Ekzistas forta tradicio ke oni - kiam oni uzas la vorton "Esperanto" en la lingvo Esperanto, skribu ĝin per komenca majusklo. La kialo estas ke "esperanto" simple signifas personon, kiu esperas. Ludoviko Lazaro Zamenhof nomis sin "D-ro Esperanto". Tiu pseŭdonimo estis skribita per majusklo, ĉar ĝi estis uzata kiel nomo, kiu ordinare skribiĝas per majusklo. La lingvo transprenis sian nomon de Zamenhof, kaj ĝia nomo tial estas "Esperanto" kun majusklo. Ankaŭ la adjektivo "Esperanta" kaj "Esperantujo", kiu aludas la ne-geografia "Esperanto-lando", aperas majuskle. Tamen vortoj kiel "esperantisto" kaj "esperantologio" skribiĝas minuskle.

Aliaj lingvoj, kiel ekzemple la sveda, estas skribitaj per minusklo.

Tiuj ĉi reguloj estas la ordinara lingvouzo. Tamen en Nova PIV estas skribite ke la vorto "Esperanto" skribiĝas ankaŭ minuskle. La redaktoro de La Espero same estas iom nekonsvena. Ofte mi majuskligas la vorton en tekstoj, sed ne ĉiam.

Cetere se oni skribas pri Esperanto en sveda lingvo oni skribas la vorton minuskle: *Talar du esperanto?*

Leif Nordenstorm

Gotenburgo aŭ Göteborg

Antaŭ la Universala Kongreso estas grave scii ĉu oni diru "Gotenburgo" aŭ "Göteborg" en Esperanto. Ambaŭ formoj estas korektaj, sed estas konvene uzi la formojn en malsamaj situacioj.

En adresoj oni uzu la nacilingvan formon. Kiam oni skribas pri iu urbo aŭ alia loko en novajrevuo kiel Monato oni ordinare uzas nacilingvan formon, ĉar estas grave ke la legantoj facile retrovu la lokon sur nacilingva mapo.

Kiam oni uzas iun loknomon plurfoje en romano aŭ novelo, estas pli konvene uzi esperantigitan formon, ĉar ĝi estas pli facile uzebla en la Esperanta gramatiko.

Alia tendenco estas ke grandaj urboj ĝenerale havas apartan Esperantan nomon; malgrandaj urboj

male nur havas nacilingvan, ĉar ne niu inventis Esperantan formon, aŭ ĉar Esperanta formo restus nekomprenebla por multaj homoj.

Alia tendenco estas ke oni pli kaj pli ofte uzas nacilingvajn nomformojn.

Kion vi opinias? Kio estas la plej bona lingvouzo?

Vad heter jultomten på esperanto?

Frågan om vad jultomten heter på esperanto har inte bara ett svar. Problemet är att det finns många olika traditioner om med helt olika rötter som har vuxit ihop till de föreställningar om jultomten som finns i olika länder i världen.

Våra nordiska ofta vresiga småtomtar som vaktade tomterna (därför "tomte" och gårdarna kallas lämpligen *koboldo* på esperanto.

I många länder i Västeuropa firas minnet av den helige Nikolaus av Myra i nuvarande Turkiet, född på 200-talet. Hans är känd för att vara barnens beskyddare och i många länder klär man ut sig till *Sankta Nikolao*, som han kallas på esperanto, och ger gåvor till barnen på hans minnesdag 6 december. Våra nutida jultomtar i Sverige är snarast en korsning av de nordiska småtomtarna och av Sankt Nikolaus.

I Ryssland och Ukraina har inte Sankt Nikolaus haft samma starka ställning i stället är det "Farfar Frost" (*Avo Frost*), som kommer med julklappar, antingen 25 december eller på nyårsafton eller vid den ortodoxa julen i januari. Till utseendet är han identisk med både vår jultomte och med Sankt Nikolaus.

Vad skall man då kalla jultomten när han dyker upp i Sverige. Förslagsvis kallas han *Kristnaska viro*, men man får vara beredd att förklara att han är vår version av *Sankta Nikolao* eller *Avo Frost*.

Det här är ett exempel på att det inte alltid finns översättningar som till hundra procent täcker betydelsen i ett annat språk. Olika föreställningar om jultomten finns i olika länder och hos olika personer. Man kan inte ge varje föreställning ett eget namn. På så sätt är alla språk begränsade.

Ekzistas internaciaj normoj por datoj

Leganto de la sveda gazeto Dagens nyheter plendis ke regas haoso pri datoj ekzemple sur pakajoj kun nutraĵoj. Se oni ekzemple legas 04-10-01 sur ĝi oni ne scias ĉu tio en la lando, kie la varo estis fabrikita signifas ke oni rekomendas ke oni manĝu la nutraĵon ĝis la 4a oktobro de 2001 (Usono), ĝis la 1a oktobro de 2004 (Svedio) aŭ ĝis la 10a de aprilo de 2001 (Francio). Post kelkaj tagoj respondis Christer Kiselman, profesoro pri matematiko en la Upsala universitato:

"Ekzistas internacia normo kiel oni skribu datojn kaj precizajn horojn (ISO 8601). Ekzistas eŭropa normo (EN 28601). Ekzistas ankaŭ naciaj normoj en multaj landoj, i.a. en Usono kaj en ĉiuj EU-landoj, ekzemple en Svedio. Ĉiuj ĉi normoj diras la samon: oni sekvu la modelon 2003-01-04 23:59:59.

Aĉeti ISO 8601 kostas 104 svisajn frankojn, sed ekzistas sennokoste nombro da klarigaj skribaĵoj sur la tuttera teksaĵo.

La ideo estas ke oni unue mencias la plej grandan unuon kaj poste la malpli grandajn. En la jardato 2003 la duo signifajn milojn, la trio unuojn. Ĉiuj instancoj, kiuj pripensis tiun ĉi problemon trovis la saman rezulton. Ni nun devas nur praktike utiligi ĝin."

La redaktoro de La Espero proponas ke ĉiuj esperantistoj sekvu la konsilon de Christer Kiselman kaj de "ĉiuj instancoj", kiam ni skribas datojn kaj horojn per ciferoj. Kiam ni skribas personan leteron aŭ beletron ni plej ofte volas skribi la nomon de la monato per literoj, sed tio estas tute alia afero.

Christer Kiselman & LN

PRELEGO PRI AZIO

Nia kolego "Esperanto en Danio" skribas ke Frederik Hoffmann Eriksen dum tri monatoj en 2002 vojaĝis en Malajzio, Singapuro, Ĉinio kaj ĝiaj partoj Hongkongo kaj Makao. Li volas prelegi pri la vojaĝo en lokaj kluboj.

Eble ankaŭ ŝvedaj kluboj povus demandi?

Frederik Hoffmann Eriksen, Haraldsgade 100, 3. tv., DK-2100 København Ø, Danio; frederikeriksen@post.cybercity.dk

"Avo Frosto" lernis Esperanton

Ekde la nuna jaro "Avo Frosto" en Kanado respondos ankaŭ Esperantajn leterojn. Tradicie la kanada poŝto zorgas pri tio, ke en la kristnaska periodo leteroj de infanoj al "Avo Frosto" ricevas respondon - ne nur en la landaj lingvoj franca kaj angla, sed ankaŭ en dudeko da pliaj lingvoj. La Esperanto-Societo Kebekia nun atingis, ke oni respondos ankaŭ leterojn en Esperanto. Tio certe ĝojigos tutmonde en Esperantlingvaj familioj la ĉirkaŭ 500 infanojn, kiuj uzas Esperanton hejme kiel gepatran lingvon, kaj pliajn infanojn, kiuj lernis la lingvon en lernejo, en libertempo aŭ dum la ferioj. La kanada poŝto invitas infanojn (kaj junanimulojn) el la tuta mondo. La leteron oni skribu mane, ankaŭ la etuloj, kiuj ankoraŭ lernas skribi; la leteroj direktiĝu al: Avo Frosto, Norda Poluso, HOH OHO, Kanado. Pliajn informojn liveras Avo Frosto, <avofrosto@yahoo.ca>, kie oni ankaŭ petu respondon, okaze se perdiĝis letero.

89-a Japana E-kongreso

En la 4-6-a de oktobro 2002, sukcese okazis la 89-a Japana Esperanto-Kongreso en la urbo Hukusima. La simbola temo estis "Floru Kulturo Porpacal!". Al ĝi aliĝis 424 personoj, dume el ili 248 efektive vizitis la kongresejon. Krome 112 civitanoj aŭskultis la publikan prelegon de s-ro Hemmi Yo. Inaŭgure salutis Sibayama, nome de la kongresa prezidanto kaj nome de la urbestro de Hukusima. Sekvis salutoj de reprezentantoj el Uzbekistano kaj Vjetnamio. Mesaĝo venis el UEA, la Korea Esperanto-Asocio, la Ĉina Esperanto-Ligo kaj Reza el Taiwan. Dum la kongreso okazis kunveno por prikonsideri organizadon de la 100-jara jubileo de la japana E-movado organizita en 2006 kaj inviton de UK en 2007 en banloko Iizaka. Okazis ankaŭ multaj fakkunsidoj kaj la Esperantlingva prelego "Nuna lingvo-komunikada situacio en la multlingva Rusio" de Sergej Anikejev, ruso loĝanta en Japanio.

Ferme prezentitaj estis venontaj kongresoj: la kongresa flago estis transdonita al Kameoka: la 90-a Kongreso okazos en la 11-13-a de okto-

bro 2003 en Kameoka. La 91-a Kongreso en la 22-24-a de oktobro 2004 en Inuyama.

E-instruistoj je la dispono de ĉiuj

Ekde oktobro 2002 la Afrika Oficejo de UEA en Lome, Togolando, metas je la dispono de ĉiuj E-organizaĵoj (landaj asocioj, kluboj ktp) E-instruistojn. Tiuj E-instruistoj estas disponeblaj dum la tuta jaro escepte de decembro kaj helpas vin organizi ion ajn Esperantan. Do se nun vi intencas organizi kurson por gekomencantoj kaj perfektigajn kursojn en via lando, bonvolu tuj kontaktiĝi kun la Afrika Oficejo de UEA. Sed vi nepre devas sendi la petleteron por E-instruistoj al la Afrika Oficejo de UEA rete <afrika-oficejo@hotmail.com> aŭ helikpoŝte (B.P 13169 Lome Togo) tri monatojn antaŭ la dato de la aranĝo por la afrikanoj kaj ses monatojn por la eksterafrikanoj. Kune ni verdigu la mondon per la lingvo de Zamenhof.

AIS en Slovakio

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino, okazigis sian 25-an Sanmarinecan Universitatan Sesion en la Slovaka urbo Nitra inter la 1-a kaj 8-a de septembro 2002. Partoprenis trideko da studentoj, el kiuj deko sukcesis en bakalaŭriga studfina ekzameno. Parto de la sesio okazis en la urbo Komárno apud la Hungara landlimo, en kiu AIS intencas kunfandi internacian alternejon.

En 2003 AIS planas okazigi sesion en sia naskiĝlando San-Marino.

Esperantistaj rotarianoj

Pli ol 19000 rotarianoj el 146 landoj kongresis inter la 23-a kaj 26-a de junio en Barcelono. La plej malnova fak-asocio de Rotario Internacia, Rotaria Amikaro de Esperantistoj, fondita en 1928 havis standon, kiu informis pri Esperanto.

La ĉi-jara devizo de Rotario Internacia estas "Plantu Semojn de Amo"

Planoj traduki fabelojn de Andersen

En 2005 estos la 200-jara jubileo de H.C. Andersen, dana fabeloverkisto. Multaj esperantistoj scias ke multaj el la fabeloj de Andersen estas tradukitaj en Esperanton jam fare de Zamenhof. (Cetere la mongola eldono de la fabeloj estas tradukita laŭ la Esperanta eldono.)

Ne nur Zamenhof, sed ankaŭ dek ses aliaj esperantistoj (aŭ pli) tradukis verkojn de Andersen en Esperanton. Nun dana komitato planas registri ĉiujn pretajn tradukojn, kaj organizi tradukon de mankantaj fabeloj kaj legendoj.

Monda Federalisma Movado

En julio okazis en Londono la 24-a konferenco de la Mondfederalisma Movado (MFM). Dum la kongreso oni organizis seminarion pri Esperanto. Parolis i.a. Charles Rowe, kiu dum kelkaj jaroj laboris por la japana religio Oomoto, kiu propagandas kaj Esperanton kaj mondfederacion.

Aniario nun teatraĵo

Aniario nun fariĝis teatraĵo. Jerzey Fornal prezentis ĝis i.a. en la SAT-kongreson en Alikanto kaj en kultura vespero organizita de Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo.

Jerzy Fornal estas aktoro en la Esperanta teatro "Espero" en Varsovio. Li havas 16 spektaklojn en sia programo, kelkajn verkitaĵojn speciale por li. Jerzy ekzamenigis en Drama Altlernejo.

Aniario jam en 1979 aperis en Esperanta traduko de Bertil Nilsson kaj William Auld. La verkinto estas nia Nobel-premiito Harry Martinsson.

DONACOJ

RONDO LANGLET
Ĉiumonataj donacoj: Ingrid Göransson, Kalmar 200 kr; Leif Nordenstorm, Boden, 150 kr; Lenart Sundman, Västerås, 100 kr; Göran Lundgren, Stockholm, 100 kr; Tore Johansson, Kalmar, 100 kr; Signhild Johansson, Kalmar, 100 kr; Börje Andersson, Skövde, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten Anders Hanerz, Skotgås, 84 kr; Wim Posthuma, Västerås, 50 kr.
Se vi volas aliĝi al Rondo Langlet, kontaktu la SEF-kasiston Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205, e-poŝto: freds@artech.se

KONTRIBUO AL SEF-PARTOPRENO EN LERNEJA FORUMO
Brita Rehm, Göteborg, 3000 kr.

FONDUSO 70+
Inger Arwedson, Huskvarna, 100 kr; Åke Ahlrén, Kista, 150 kr; Harry Bengtsson, Östersund, 200 kr.

MEMORE AL ANNA-GRETA PAHNKE
Sundsvalls Esperantoförening, 100 kr.

MEMORE AL CARL H NÄSLUND
Sundsvalls Esperantoförening, 150 kr.

Turistbroschyer på esperanto

Esperanto i Väsby har tagit på sig uppgiften att samordna ett projekt som innebär att turistbroschyer om sevärdheter skall översättas till esperanto. Inför den universella kongressen i Göteborg är det mer angeläget än någonsin. Det finns redan många turistbroschyer på esperanto om sevärdheter i Sverige. Problemet är att när upplagorna tar slut så finns inte längre texterna tillgängliga. Den här gången skall dock översättningarna publiceras även på internet, så att de finns tillgängliga lättare.

Alla esperantister och klubbar kan hjälpa till genom att översätta broschyrer. Projektet har fått namnet "Projekt NEK". "NEK" kan uttolkas "Ni esperantistoj kunlaboru". Samtidigt hedrar förkortningen Nils-Erik Kristofersons minne. Han delade sitt liv med esperanto och var engagerad att översätta turistbroschyer. Den som redan har översatt någon broschyr, eller som gärna vill översätta kan ta kontakt med: Esperanto i Västby, Projekt NEK, Hagvägen 13, 194 40 Upplands Väsby; tel. 08-590 88 218; e-post: kak@bredband.net

Skövde-klubo 70-jara

La Esperanto-klubo en Skövde festis 70-jaran jubileon per gaja aranĝo en la klubejo.

Historia trarigardo montris ke la klubo fondiĝis en oktobro 1932 kaj jam en la komenco havis 21 membrojn. Kvarfoje la klubo aranĝis SEF-kongresojn: 1939, 1949, 1966 kaj 1984. La kongreso en 1966 verŝajne estis unu el la plej internaciaj en la historio de SEF, ĉar estis partoprenantoj el 13 nacioj. Speciale sub prezidantoj kiel Lennart Åberg kan Gunnar Ringh la kluba vivo estis tre vigla. Nekalkuleblaj estis aranĝoj kun eksterlandaj gastoj.

Börje Andersson

Kurso en la popolaltlernejo de Kvarnby

Komenciĝis kurso pri Esperanto, kiel libere elektebla lingvo, en popolaltlernejo de Kvarnby. Partoprenas ok gelnantoj, inter kiuj unu estas studrektor de la lernejo.

Sten Svenonius

Esperanto@Interreto

Fine de oktobro por unu semajno okazis la E@I-seminario en Lesjöfors. Oni loĝis en Esperanto-Gården kaj laboris en Stålvallaskolan. Venis ĉirkaŭ 30 partoprenantoj el Kanado, Usono, Rusio, Slovenio, Jugoslavio, Kroatio, Pollando, Hungario, Germanio, Italio, Francio, Norvegio kaj Svedio. Kunordiganto estis Hokan Lundberg.

La ĉefa temo de la seminario estis reta informado por prepari informmaterialon taŭgan por interreto. La tempo dividiĝis inter prelegoj kaj grupa laboro.

En la loka gazeto Filipstads tidning aperis artikolo kaj intervjuo kun Hokan Lundberg. La venontaj seminarioj estos espereble en Usono kaj poste en Irano.

Post la seminario kelkaj gejunuloj restis por plani la venontjaran Internacian Junularan Kongreson en Lesjöfors.

Hokan Lundberg

Översättningar från esperanto till svenska

La Espero efterlyser härmed översättningar från esperanto till svenska. Vem har gjort sådana översättningar eller känner till var de finns? Följande är redan kända:

* "Mr. Tot köper tusen par ögon" av Jean Forge. Utgiven på svenska 1939 (troligen inte hela boken). Vem har ett exemplar av denna?

* "Kumeuaua, djungelns son" av Tibor Sekelj. Orginalet är på esperanto. Översatt till närmare 20 språk. Svensk översättning av Leif Nordenstorm, utgiven 1987.

* "I går, i dag, i morgon" av Bernard Golden, översatt av Leif Nordenstorm. Ej publicerad.

Finns det någon som har fler översättningar från esperanto till svenska liggande i byrålådan? År t.ex. Stellan Engholms romaner översatta till svenska. (Han är för övrigt den ende esperantoförfattaren som har ett eget uppslagsord i Nationalencyklopedin.) Hör av er till La Esperos redaktör, se sid. 2.

Leif Nordenstorm

Svedino premiita en fabelkonkurso

Okazis tutmonda fabelkonkurso por infanoj 2002. La ĵurianoj de Fabelkonkurso estis Raita Pyhälä, Sylvia Hämäläinen kaj Istvan Ertl. UEA donacis la libropremiojn por la gajnintoj.

La rezultoj estas:

Kategorio A:

1. Koro de mevo: Francesco Bentigvogli, Italio
2. Mia songo: Alina Calibe Brucker, Germanio
3. Obeanta hundido: Benedetta Ravaglia: Italio

Kategorio B:

1. Ĉe la marbordo: Paulina Christianesen, Svedio
2. Laborema Linda: Niina Tauriainen, Finnlando
3. Fabelo: Jana Herbsta, Latvio

Kategorio C:

1. Kiel formikbebo savis formikejon kaj konatiĝis kun Avo Frosto: Stefani Strunjak, Kroatio
2. Norma kaj paseroj: Ivana Milijic, Jugoslavio-Serbio
3. Aventuro de koboldo: Kirsi Tauriainen, Finnlando

Aldone la premion 'Fabelo Internacia' gajnis Stefani Strunjak per sia fabelo 'Kiam formikbebo savis formikejon kaj konatiĝis kun Avo Frosto'.

La premiifesto okazis en Taivalkoski en 11-a de novembro 2002, en malnovstila vendejo-kafejo Jalava. Ĉe estis gajnintoj de finnlingva branĉo de la konkurso, kaj la fratinoj Tauriainen de esperantlingva branĉo de la konkurso.

Premioj al aliaj gajnintoj estis senditaj perpoŝte.

Aini

Iom pri suna kuirado

DONACOJ

MEMORE AL BERTIL DANIELSSON, ÅRJÄNG
Bo Hedberg,
Årjäng, 300 kr. Årjängs Esperanto-klubb, 300 kr.

MEMORE AL NORAH SVENSSON
Malte Markheden,
100 kr.

SEF kore dankas por la donacoj. Novaj estas bonvenaj al pĝ. 2012-3.

En interreto oni povas trovi multajn interesaĵojn. Tion ĉi la redaktoro trovis ĉe <http://boliviainiti.free.fr/esperanto/accueil.html> Se vi volas legi plu vizitu tion.

"La homaro havas piedon irantan al la steloj, kaj la alia, kiu enprofundiĝas en mizeroceno..." Laŭ la Unuiĝintaj Nacioj, en 1980, 500 milionoj da homoj uzis lignon por kuirado. En 2002, ili estas 2 miliardoj!

Ĉu ne estas skandale ke en la jaro 2000, por kuiri siajn nutraĵojn, du miliardoj da homoj devas uzi la fekaĵojn de siaj bestoj kaj detrui siajn lastajn arbojn; tiel ili kondamnas sin mem kaj siajn infanojn post nelonge?

Kiam gericoj malŝparas riĉaĵojn, kial oni devas fidi diskretajn neregistartajn organizojn zorgantajn pri internacia helpo kiel Bolivia Inti, kun tiom malmulte da rimedoj financaj kaj nefinancaj por plibonigi la vivon

de niaj gefratoj de la Sudo?

Delonge oni konas la principon de sunkuiriloj: kun la prezo de fusilo, kiom da dekoj da sunkuiriloj? Tiuj sudaj landoj estas tiom riĉaj je suno!

La suna kuirado kaj ĝiaj avantaĝoj

1. SANO: evitigas malsanojn okulajn kaj pulmajn (pro fumo), kaj dorsajn (pro portado de ligno); forigas diareojn (per pasteŭrizado de akvo).

2. MEDIO: reduktas senarbigon kaj erozion de grundoj; malpliigas eligon de forcejefikaj gasoj (CO₂); biomaso, herboj kaj bovfekaĵoj restas uzablaj kiel sterkoj naturaj por plinutri grundon.

3. EKONOMIO: reduktas la elspezojn de brulaĵoj (ligno, karbo, gaso, keroseno); la fabrikado de sunkuiriloj kreas laborpostenojn lokajn

4. LIBERECO: virinoj kaj infanoj estas "liberigataj" po dekkvin horoj semajne de teda laboro de ligno. Tiu tempo estas dis-

ponebla por edukado, klerigado, la zorgoj al la familio.

En la landoj de la TRIA MONDO, du miliardoj da homoj uzas lignon por kuirado. La kolekto de ligno necesigas dekkvin horojn da laboro ĉiusemajne por unu familio. Kaj ofte estas virinoj kaj infanoj, kiuj eltenas tiun laboron. Tio kaŭzas ĉiujare senarbarigon de surfaco granda kiel Belgio.

La sunkuirilo

Skatolo izolita per duobla vitrosepo kaj nigra ferlado funde por estigi la forcejefikon. Simple konstruebla el materialoj, kiujn oni trovas ĉie (ligno, krucligno, aluminio hejma, vitro kaj lano de ŝafoj por izolado).

Oni povas atingi temperaturo ĉirkaŭ 130°C per tiu simpla modelo. Se oni aldonas tri reflektilojn kunhelpajn la temperaturo povas atingi 170°. Ni obtenis rezultojn grandegajn same bone en areo kampara kiel en areo urba.

LIBROJ

Ne nur por budhanoj

La Dharmo-pado. El la palia originalo tradukis Gunnar Gällmo. Serio Oriento-Okcidento 36. Eldona Societo Esperanto 2002. 110 paĝoj.

La Dharmo-pado estas budhana klasikaĵo, parto de la budhana kolektaĵo de sanktaj skriboj, nomata Tripitako (laŭlitere 'tri korboj'). La tuto estas pli ol dek fojojn pli granda ol la biblio. La Dharmo-pado do estas nur malgranda parto de Tripitako, sed eble la plej ofte tradukata, ĉar ĝi estas sufiĉe facile komprenebla por nebudhanoj. Iel ĝi estas komparebla al la biblia libro "La sentencoj de Salomono", konsistanta el sentencoj pri ĝenerala homa saĝeco. La samaj sentencoj aperas ankaŭ en hinduismaj kaj jainismaj skribaĵoj. Al la generalaj sentencoj aldoniĝas specife budhisma sentencoj. Por budhismaĵoj monaĥoj estas grave parkeri La Dharmo-padon.

La libro konsistas el 26 ĉapitroj kun 423 sentencoj. Ni legu kelkajn ekzemplojn:

"Iradas stultaj frenezuloj kiel malamikoj de si mem, farante malbonajn agojn, kiuj amarajn fruktojn kreas." (66)

"Pli bone ol vivi cent jarojn sensaĝece, neregate, estas unutaga vivo saga, medita." (111)

"Sin mem unue oni ĝuste starigu, poste aliajn konsilu. Ne fiagu sagulo." (158)

Tiuj ĉi ekzemploj montras ke la Dharmo-pado estas leginda ne nur por budhanoj, sed por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri homa sago kaj pri homaj spertoj. Tamen budhano, aŭ tiu, kiu interesiĝas pri tiu religio, povas legi la saman libron kiel religian dokumenton.

Kvankam mi ne povas kompari kun la palia originalo, mi povas diri ke la traduko estas flua kaj ĝuebla. La tradukinto Gunnar Gällmo faris bonan laboron, kvankam li mem komentas: "Do, oni devas iam denove provi pli bone traduki ĝin, sen esperi pri fina venko."

Leif Nordenstorm

La Dharmo-pado



ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Nova PIV: unua impresio

RECENSENTER BEHŔOVS

Vill du recensera böcker för La Esperanto. Ta kontakt med redaktören, se sid. 2, och berätta vilka slags böcker du vill recensera: prosa, poesi, facklitteratur (vilket ämne). La Espero behöver fler medarbetare.

Meze de 2002 aperis nova versio de Plena Ilustrita Vortaro (NPIV), kiu sekvas la unuan version el 1970 (PIV). Bona recenzo de Bertilo Wennergren jam aperis en *Monato* (kaj legeblas rete ĉe <http://www.esperanto.be/fel/aperinta/007914.html>), kaj certe sekvos ĝin multaj. NPIV same kiel ĝis nun PIV estos objekto de diskutoj, kritikoj, kalumnioj. Tamen seriozaj uzantoj de la lingvo utiligos ĝin, ĉar ĝi estas kaj restos la plej grava vorta konsultilo.

Ĝisdatigo

La plej frapa ŝanĝo en NPIV rilate al PIV estas, ke nun finfine ĝi vere estas *ilustrita* – kelkfoje trafite kaj utile. En la vortostoko plej frapis min, ke oni inkluzivis aron da nuntempaj vortoj el la vivanta, ĉiutage uzata lingvo, kiu pro naturaj kialoj mankis en PIV. Do, oni trovas ekz. *aidoso, espresso, faksi, forfikigi, geja, ĝinzo, hamburgero, handikapo, kasedilo, kvizo, mafio, nifo, pico, poŝtelefono, retpoŝto, skani, t-ĉemizo, terpomfrito*. Krome oni akceptis kelkajn nun vivantajn signifojn de malnovaj vortoj, ekz. de *alternativo, dosiero, drogo, muso*. Aperas ankaŭ aro da vortoj iufoje uzataj kaj troveblaj en aliaj vortaroj, kiel *ĉipa, desaponti, despero, gemuta, hati, kidnapi, kiki, rori, samea, setli, sponta, vanui*. La kreskanta vortaro do – almenaŭ dum kelkaj jaroj – respondos pli bone al la malsamaj nuntempaj bezonoj de diversaj uzantoj ol ĝia pli ol tridekjara antaŭulo.

NPIV tamen ne adoptis ĉiujn ajn vortojn. Ekz. mankas la subaj radikoj, kvankam ili jam troveblas en minimume po kvin ĝis dek du aliaj vortaroj: *darfi, doso, filero, Gotlando, Kvinkagesimo, moleskino, potamogeto, semiotiko, ŝotiŝo*.

Ekzemploj

La plej grava kaj utila trajto de *kaj* la malnova PIV *kaj* la nova NPIV estas ilia amaso da ekzemploj sub preskaŭ ĉiu kapvorto. Indas ripeti ĝeneralan konsilon: ne haltu ĉe la difinoj, sed legu la ekzemplojn! Nun oni aldonis al la tradiciaj zamenhofaj, kabeaj, bibliaj ktp. ankaŭ aron da pliaj fontoj, el kiuj pluraj nuntempaj. La nombro de ekzemploj ĉerpitaj el tiuj novaj fontoj tamen ŝajnas tre limigita. Je rapida foliumado oni simple ne rimarkas ilin.

PIV-ismoj malnovaj kaj novaj

Oni ofte kritikadis vortelektajn de

PIV. Interesa artikolo de Anna Löwenstein rete legebla ĉe <http://esperanto.digiweb.com.br/vidpunkto/piv.htm>) donas plurajn ekzemplojn, kie PIV eble klopodis ŝanĝi la lingvon for de la tradicia, vivanta lingvaĵo. En pluraj el tiuj kazoj, eble la plej multaj, NPIV nun revenas al la tradicia formo, kiun PIV vane provis ekstermi, dum en kelkaj okazoj NPIV daŭrigas la batalon de PIV.

Mi mencias ekzemplojn ne ĉerpitajn el la traktajo de Anna Löwenstein. La tradician vorton *navedo* PIV ial volis ŝanĝi al *naveto*. En NPIV ni feliĉe retrovas *navedo*'n. Simile pri *vato*, unuo de (elektra) povo (W), kie PIV provis enkonduki la formon *vatto*. NPIV revenas al la normala *vato*.

Mala ekzemplo estas *vando*, malnova vorto ofte uzata kaj trovebla en Plena Vortaro de 1933. En PIV oni vane volis anstataŭigi ĝin per *septo*, kaj kvankam la esperantistoj ĝis nun ne adoptis tiun proponon, sed daŭre paroladas pri *vandoj*, NPIV tamen plu ripetas la saman stultajon.

Krome ŝajnas, ke NPIV volas krei ankaŭ siajn proprajn novajn "PIV-ismojn". Precipe la kampo de plantoj kaj bestoj ŝajnas en NPIV esti labor-kampo de kreemulo sen respekto al la vivanta lingvo. Planto konata de multaj eŭropanoj estas *tifao* (latine *Typcha*), kiu levas siajn cigarsimilajn spikojn en malsekaj lokoj. Ĝi aperas en minimume dek ses vortaroj (petu liston de stenjo@hotmail.com), sed ne en PIV. Nun la planto tamen finfine penetris en NPIV – en la formo *"tifeo"*! Oni ne scias ĉu ridi aŭ plori.

Simile, birdo nomata *kolimbo* de la fundamento de Esperanto, de Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) kaj de pluraj vortaroj (interalie PIV) kaj lingvouzantoj, nun en NPIV subite iĝis *"gavio"*. La *monta lagopo*, ĉasata de nordianoj kaj konata de ORE kaj pluraj vortaroj, nun aperas kiel *"alpa lagopodo"*!

Malgraŭ kapricoj kaj kaprioloj de niaj vortaristoj, tamen la plej grava unua impresio de ĉi nova vortarego estas ĝia modernigo kaj granda utilo por la uzanto. Kaj sur la kampo de komunaj, ĉiutagaj vortoj, ĝia respekto al reale uzataj formoj ŝajnas sufiĉe granda – tamen kun kelkaj hereditaj esceptoj. Kiam nacilingvaj esperanto-vortaroj fojfoje diverĝas, NPIV ekde nun estos nia ĉefa komuna referenco pri vortoj.

Sten Johansson

Pri la kosmo



David Galadé-Enríquez & Amri Wandel: *La kosmo kaj ni. Galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo*. Antverpeno 2001. 199 paĝoj.

Unuafoje en Esperanto aperis ĝenerala lernolibro pri astronomio. Skribita de du profesiaj astronomoj, la verko priskribas la tutan universon en maniero komprenebla por nefakuloj. Al mi plaĉis aparte la komparoj inter ĉielaj kaj surteraj fenomenoj. Ĉu vi ekzemple sciis ke la diametro de la luno estas same granda kiel Aŭstralio, kaj ke oni bezonus kvincent jarojn por vojaĝi aviadile al Plutono, se eblus?

La unuaj ĉapitroj temas pri ĝenerala astronomio: la sunsistemo, la firmamento, teleskopoj kaj la kosmo. Sekvas ĉapitroj pri astrofiziko kaj pri la demando ĉu estas vivo ekster la tero kaj pri diversaj projektoj serĉi tian vivon.

Epilogo temas pri la tempo ekde la praeksplozo ĝis la homo. "Praeksplozo" cetere estas bonega termino por tio, kio ne en la sveda nomas per la angla esprimo "big bang". La libro cetere estas bona trezoro por tiu, kiu volas lerni la nomojn de konstelacioj kaj steloj en Esperanto.

La libro estas abunde ilustrita per nigra-blankaj lernigaj ilustraĵoj.

Ĝenas min fakte nur unu afero. Ĉiuj distancomezuroj estas donitaj kaj en kilometroj kaj en "mile", kiu – se oni entute devus uzi tiun arhaikan mezuron, – nomiĝas angla mejlo en Esperanto.

La libro tamen estas interesege, leginda kaj tradukinda nacilingven.

Leif Nordenstorm

BESTÄLL BÖCKER!

BESTÄLL LJUDBAND

TALBOK

Denaska kongresano, 2 ljudband, 102,00.

SPRÄKKURS

(Tillhörande böcker se till höger.)

Jen nia mondo, band 1, 51,00.

Jen nia mondo, band 2, 51,00.

MUSIK

Folioj de mia memoro (Jomart & Nataša, 38,00.

Banden beställs från samma adress som böckerna. Se nere till höger.

Titolo	Verkisto	Paĝoj	Prezo	Titel	Författare	Sidor	Pris
1887 kaj la sekvo	Waringhien, Gaston	312	170,00	Kunvojaĝu	Paul P Gubbins	240	130,00
Allas andra språk	Malmgren, Ernfrid	126	64,00	Kvinpinta kantaro 2000		72	48,00
Amparolo	István Nemere	80	48,00	La beleco de Merab	Lindgren, Torgny	80	48,00
Aniario	Martinson, Harry	174	85,00	La bona lingvo	Piron, Claude	111	120,00
Baza Esperanta radikaro	Wouter F Pilger	159	75,00	La diplomato kiu ridis	Harris, Ralph	61	95,00
Bona rido...	Helm, Axel	85	25,00	La fenomeno Svislando	Baur, Arthur	168	60,00
Bona Ŝanco	Bormann, Werner	246	90,00	La kiso kaj dek tri aliaj noveloj	Söderberg, Hjalmar	56	40,00
Denaska kongresano kaj aliaj noveloj	Johansson, Sten	46	32,00	La krimo de Katrina	Johansson, Sten	36	32,00
Dharmopado (bind.)	Gällmo, Gunnar, trad	110	180,00	La lada tambureto	Grass, Günter	530	360,00
Doktoro Glas	Söderberg, Hjalmar	89	56,00	La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson	Lagerlöf, Selma	615	265,00
Ekparolu Esperanton	Forsman, Lars	52	45,00	La orpantolono	Nilsson, Bertil (trad.)	40	32,00
En la realo troviĝas truo	Ses aŭtoroj	84	48,00	La pelto, kaj 14 aliaj noveloj	Söderberg, Hjalmar	72	48,00
Er-ar-o	Jacobson, Stig	52	40,00	La vojo de serpento sur roko	Lindgren, Torgny	80	48,00
Esperantaj sinonimoj	Ojala, Jaan	96	50,00	Lando malekzista	Södergran, Edith	92	90,00
Esperantisk-Svensk ordbok	Nylén, Paul	267	51,00	Lilla esperanto-ordboken	Vilborg, Ebbe	193	76,00
Esperanto Kompendium, Nya Esperanto, Language, 2 Literature and Community	Wennergren, Bertil	81	102,00	Lingva arto, Jubilea libro omaĝe al W Auld kaj M Boulton	23 aŭtoroj	222	165,00
Etimologia vortaro de Esperanto A-D	Janton, Pierre	169	160,00	Marta	Orzeszko, Elisa	256	120,00
Etimologia vortaro de Esperanto E-Ĵ	Vilborg, Ebbe	104	127,00	Mi serĉis oron kaj oleon sed (Bind)	Flood, David		27,00
Etimologia vortaro de Esperanto K-M	Vilborg, Ebbe	114	127,00	Mistero ĉe nigra lago	Johansson, Sten	80	48,00
Etimologia vortaro de Esperanto N-R	Vilborg, Ebbe	128	127,00	Mokrokalvo, la gigantegego	Gällmo, Gunnar	68	56,00
Etimologia vortaro de Esperanto S-Z	Vilborg, Ebbe	124	127,00	Monumente pri esperanto	Röllinger, Hugo	110	70,00
Etimologia vortaro de Esperanto, alla 5 delar			585,00	Musono	Devi, Vimala	64	56,00
Falĉita kiel fojno	Johansson, Sten	76	48,00	Neĝo kaŝas nur...	Johansson, Sten	80	48,00
Gerda Malaperis, Ordlista till	Gustafsson, Karl-Gustaf	64	40,00	Nobela novelaro	Lagerkvist, Pär	60	40,00
Hejma vortaro, Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto	Jouko Lindstedt (Red)	62	80,00		Johnson, Eyvind		
Hieraŭ hodiaŭ morgaŭ	Golden, Bernard	96	50,00	Nova Esperanto Krestomatio	Auld, William, (red)	509	130,00
Higieno de l' murdisto	Amélie Nothomb	150	80,00	Okulo	Macgill, Stefan		40,00
Homaj rajtoj, demandoj kaj respondoj	Leah Levin	140	80,00	Ŭmotos mission på esperanto	Nordenstorm, Leif	220	150,00
Ĝis revido, krokodilo!	Johansson, Sten	69	48,00	Ordbok Svenska-Esperanto	Vilborg, Ebbe	478	382,00
Inter sudo kaj nordo	Szilagyi, F		51,00	Orm la ruĝa	Bengtsson, Frans G	215	127,00
Interkona mateno	Johansson, Sten	51	40,00	Pipi Ŝtrumpolonga	Lindgren, Astrid	174	110,00
Internationelt språk (1:a läroboken- Numrerad)	Dr Esperanto	47	100,00	Planspråket som överlevde, del 1 + del 2	Gustafsson, K-G	7+74	60,00
Introduktion till esperanto	Nilsson, Bertil		25,00	Printempo de morto	Zilahy, Lajos	121	51,00
Islanda pravoĉoj (bind)	Ragnarsson, Baldur	110	51,00	Rimvortaro	Cooley, Jonathan	79	95,00
Jaroj sur tero	Lakshmiswar, Sinha	126	51,00	Sascha	Forsman, Lars	60	50,00
Jen nia mondo 1	Wells, John	74	76,00	Serĉu kaj vi trovos	Nemere, István	72	48,00
Jen nia mondo 2	Wells, John	102	76,00	Sonĝodramo	Strindberg, August	80	56,00
Kelkaj faktoj pri budhismo	Gällmo, Gunnar	77	85,00	Sveda floraro	Johansson, Sten (red)	64	40,00
Kion ajn	Johansson, Sten		60,00	Svensk Esperanto-grammatik	Carlén, Erik	94	64,00
Kredo Floroj Dinamito (bind)	Olsson, E		38,00	Ŝipestro rakontas (bind)	Lundquist, F T		38,00
Kulturo kaj evoluo	Mervyn Claxton	60	65,00	Tio konvenas!	Almqvist, Carl Jonas	80	48,00
Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo, Esperanto + svenska	Sekelj, Tibor	94	75,00		Love		
				Tiu toskana septembro	Tavanti, C/Ertl, I	137	95,00
				Tra lando de indianoj (bind)	Sekelj, Tibor	186	51,00
				Trans maro kaj morto	Johansson, Sten	80	56,00
				Tria kolekto da krimnoveloj	Gates, Ronald Cecil	84	75,00
				Vivu la stel' (kantareto)		62	25,00
				Vojaĝo en Esperanto-lando	Kolker, Boris		165,00

Böckerna kan beställas från: Svenska Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00. E-post: sef@esperanto.se. Moms ingår i alla priser. Porto tillkommer.

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Medlemsavgifter för 2003

Medlemsavgift för Svenska Esperantoförbundet för 2003

Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*).

Tillägsexemplar kostar 100 kr/år).

Medlemmar som är anslutna via lokala esperantoklubbar betalar sin medlemsavgift till den lokala klubben.

Prenumeration för La Espero 2002: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Kelkaj gravaj datoj en 2003

22-28 junio
Somera lingvokurso en Esperanto-Gården en Lesjöfors.

19-26 julio
Internacia Junulara Kongreso en Esperanto-Gården en Lesjöfors

26 julio - 2 aŭgusto
Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo

3-7 aŭgusto
Kultura Esperanto-Festivalo en Elsinoro (Helsingör) kaj Helisingborgo

Dags att prenumerera!

Svenska Esperantoförbundet står till tjänst med tidningsprenumerationer för 2003. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29-5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52.

Tidning	Nr/år	Pris kr.
Brazila Esperantisto	4	160*
Esperanto Finnlando	6	135*
Esperanto	11	310
Esperanto-Dokumentoj	10	240
Esperanto en Danio	5-6	125
(Eventoj kommer inte längre ut.)		
Retventoj (på internet) Nästan dagligen		180
Fonto	12	285
Heroldo de Esperanto	17	280
ICEM	4	175
Informoj de EAE	4	80
Juna amiko (rabatt vid mer än ett ex.)	4	115
Komencanto (större nummer)	6	140
Kontakto	6	185
La Hirundo	8	100
La Jaro	1	49
La Kancerkliniko	5	190
La Ondo	12	235
Literatura Foiro	6	260
Litova Stelo	6	135
Monato	12	410
Monato (retversio)		246
Norvega Esperantisto	6	100*
Oomoto	2	100*
Rok'Gazet (1 nr/år; för 155 kr får man 3 nr)		155
Scienca Revuo	4	190
TEJO-tutmonde	4	95

När kommer La Espero 2003?

	Stopdatum	Utkommer senast
Nr 1	17 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	28 mars
Nr 3	16 maj	13 juni
Nr 4	7 augusti	8 september
Nr 5	17 oktober	17 november
Nr 6	20 november	8 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktionen i god tid innan.